

## Kunsido de la Federacia Asembleo la 1an de majo 2016

Dimanĉon la 1an de majo 2016 je la 10a00 kunsidas la Federacia Asembleo de la Nordfrancia Esperanto-Federacio en Arras (salono AGAEM).

Prezidas: Michel Dechy. Protokolos: Xavier Dewidehem.

Piet Glorieux invitas al la Beneluksa Esperanto-Kongreso, kiu okazos de la 16a ĝis la 19a de septembro 2016 en Lier (apud Antverpeno).

### Agada raporto

Raportas Katja Boen. La agada raporto estas tiu sendita al UFE. En 2015 la Federacio nombris 105 membrojn. La ĉefmomento estis la 100a Universala Kongreso de Esperanto. La informilo de la Federacio ekde 2016 estas *Norda Kuriero*, kiu sendiĝas retroŝte anstataŭe de la papera *Norda Gazeto*. Okazas pluraj kursoj pri Esperanto en norda Francio. Ne okazis ekzamensesio pro la UK. Okazis la 16a Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage.

La Asembleo unuanime aprobas la agadan raporton de 2015 de la Federacio.

### Financa raporto

Raportas Daniel Calvos. Pri la federacia financo zorgis Xavier Vilain dum 10 jaroj. La Asembleo dankas kaj gratulas al li.

La financo de 2015 rezultas jene:

- Saldo de 2014: 906,22 €
- Enspezaro de 2015: 6 270,20 €
- Elspezaro de 2015: 5 938,84 €
- Saldo de 2015: 1 237,58 €
- Krome: ŝparkonto: 19 854,19 €

La financo estas tre bona. Michel Dechy emfazas, ke tiu mono utilu al agadoj, kaj ke ni ne tro timu eventualan financon minuson de tiu aŭ alia agado.

La Asembleo aprobas la financon raporton de 2015 de la Federacio (sindetenas 1).

### Renovigo de la Federacia Komitato

La Asembleo elektas la jenan Federacian Komitaton por la venontaj tri jaroj:

- El la Amiena klubo:
  - Cyrille Découture
  - Catherine Lévêque

- El la Arasa klubo:
  - Daniel Calvos
  - Roch Jullien
  - Arlette Plutniak
  - Jacky Ramon
- El la Bulojna klubo:
  - Didier Henneuse
- El la Dunkirka klubo:
  - Xavier Vilain
- El la Lilla klubo:
  - Cathie Boen
  - Michel Dechy
  - Xavier Dewidehem
  - Pierre Dufour
  - France Valet
- El la Valenciena klubo:
  - Jean Dietrich
  - Guy Deladrière

## **Eŭropa Rendevuo de Stella-Plage**

Roch Jullien organizas la Rendevuon de 2016 kaj prezentas ĝian programon. La informoj estas videblaj en la retejo: [www.arras-esperanto.fr/stella](http://www.arras-esperanto.fr/stella).

## **Norda Kuriero**

*Norda Kuriero* estas la nova, retroŝta informilo de la Federacio, pri kiu zorgas Katja Boen kaj Xavier Dewidehem. Ĝi eldoniĝas ĉiun duan monaton, kaj entenas federaciajn kaj klubajn anoncojn kaj foje memverkitajn artikolojn.

## **Dancu tutmonde**

Roch Jullien organizis la aranĝon “Dancu Tutmonde” en Araso la 20an de marto 2016; en ĝi partoprenis ĉ. 25 esperantistaj kaj neesperantistaj francoj. Li proponas, ke ĝi okazu la 16an de oktobro 2016 en Lillo por plifaciligi la partoprenon de eksterlandanoj.

## **Diversaĵoj**

Lucien Giloteaux proponas doni al interesotoj Esperantajn librojn. Jean Dietrich informas, ke la Valenciena klubo transdonis sian libraron al la Kortrejka biblioteko. Didier Henneuse memorigas, ke la Bulonja urbestro starigos internacian kulturen centron t.n. “Espero”; li proponas, ke la libraro de la Dunkirka klubo estu donota al tiu Bulonja centro (li nun atendas la respondon de la Bulonja urbodomo).

La Amiena klubo “Espéranto 80” indikas, ke pluraj siaj membroj staĝis kaj KER-ekzameniĝis en Greziljono, kio sume kostis 1 000 €. Ĝi demandas, ĉu la Federacio monkontribuos. La Asembleo precizigas, ke: UFE monhelpas al KER-ekzameniĝantoj per sia fonduso “Klubo 2000”; la Federacio monhelpas al la kandidatoj de siaj regionaj ekzamensesioj; sekve la Federacio ne povos financi la diritajn staĝon kaj ekzameniĝon de la membroj de “Espéranto 80”.